

Esperanto-Brno

Esperanto-Brno - Kluba prelego 26.3.2008

Fratoj el Tesaloniko

Miroslav Malovec

Antaŭ nelonge mi legis romanon Fratoj el Tesaloniko de Antonín Polách. Ĉi tiu ĉeĥa verkisto, nun 48-jara, estas eminenta kuracisto laboranta en Aŭstrio kaj ankaŭ eminenta verkisto de historiaj romanoj.

En sia dua romano li priskribis la vivon de Konstantino kaj Metodo. La romano okazas en Romo, en la monaĥeja ĉelo, kie Konstantino antaŭ nelonge akceptis la nomon Cirilo kaj nun estis mortanta. Li sciis, ke pro grava malsano restas al li proksimume unu semajno da vivo kaj tial li volis bilanci sian vivon interparolante kun sia pli aĝa frato. En unu tago ili ĉiam rememoras unu parton de sia vivo.

En la unua tago ili rememoris sian junaĝon kaj siajn gepatrojn. Ilia patro estis oficiro en Tesaloniko kaj kiam Konstantino estis dekjara knabeto, Metodo jam havis dudek jarojn kaj ankaŭ soldatis. Tiam li fakte nomiĝis ankoraŭ Miĥaelo kaj devis kun la patro plenumi soldatajn devojn. En tiu tempo okazis teruraj kvereloj pri tio, ĉu ikonoj estas sanktaĵoj aŭ pekaĵoj. Unuj defendis la bildojn, aliajn ilin kondamnis kaj klopodis likvidi. Ambaŭ grupoj konsideris la alian herezuloj kaj volis ilin ekstermi. Kiam regis ikonoklasta imperiestro, Miĥaelo kun sia patro devis persekuti ĉiujn posedantojn de bildoj, tamen ili ne persekutis la patrinon de Miĥaelo kaj Konstantino, kvankam ŝi havis bildojn en sia ĉambro. Foje en batalo minacis morto al Miĥaelo, sed lia patro savis lin kaj mem perdis la vivon.

Kiam Konstantino estis 17-jara, li jam estis eminenta lernanto kaj tial li estis sendita al Konstantinopolo por studi universitaton. Zorgis pri li lia onklo Teokritos, kiu estis eŭnuko kaj tamen ĉefministro. Tiu tempe regis imperiestrino Teodora, ĉar la imperiestro Miĥaelo, ŝia filo, estis ankoraŭ sesjara infano. Ŝi intence elektis eŭnukon por ne esti suspektata pri iaj amrilatoj kaj similaj kalumnioj. Konstantino lernis de sia onklo diplomation kaj vizitis lecionon de profesoro Fotios, kiu estis nur dek jarojn pli aĝa kaj post pluraj dek jaroj fariĝis patriarko.

Konstantino jam nun pruvis siajn talentojn. Li sciis plurajn lingvojn, konis parkere ne nur Bibliion, sed ankaŭ Koranon kaj multajn religiajn verkojn, kristanajn kaj islamajn. Kiam li estis 24-jara, li jam estis nomata Konstantino Filozofo. Tiam en Turkio estis forpelita islama religiestro, eminenta filozofo kaj teologo, kiu kondukis indulge al la turkaj kristanoj. Li estis sendita al ekzilo kaj novaj estroj komencis kristanojn persekuti. Al Konstantinopolo ili sendis postulon, ke la bizanca imperio sendu siajn teleogojn, kiuj disputos kun la islamaj teologoj, ĉu la persekutadfo estas prava aŭ ne. Kvankam Bizanco konsideris la turkajn kristanojn herezuloj, ili tamen

sendis ekspedicion, kiun gvidis Konstantino kiel ĉefa teologo, lia frato kiel ĉefa soldato. Konstantino antaŭ la forveturo ellernis la lingvon de la malamikoj kaj konatiĝis kun la verkoj de la forpelita islama teologo.